

# Oriente Kulturo

JARO I

OKTOBRO, 1936

No. 2

ENHAVO

- 5. Historio kaj Vivo.....Kijo Cujuki 19  
(歴史と人生——露木清彦)
- 6. Historieto de Japana Ŝintoismo I. .... M. Fukuda 23  
(日本神道史概要 I.——所員：福田正男)
- 7. Skizo sur Aina Literaturo II..... M. Igaraŝi 29  
(アイヌ文學概説 II.——所員：五十嵐正己)
  
- Ilustrita paĝo: Japana Krizantemo ..... 18  
(寫眞：日本種大輪菊)

**Societo de Oriente Kulturo**

Komagome-Dozaka 228,  
TOKIO, Japanujo




En aŭtuno, kiam ĉiuj floroj estas forvelkantaj, nur sola floras krizantemo. Ĉe heĝo, ĉe ĝardeno en la aŭtuna sunbrilo kaj klara aero freŝa, ĝi belege estas en plena florado, kaj

ĉie bonodora aromo estas plenplena.


Se ĉerizfloro (*sakura*), kiel reĝo de printempaj floroj, simbolas la japanan spiriton virecan, krizantemo (*kiku*), kiel reĝino de aŭtunaj floroj, posedas la dignon de sinjorino. Ĉerizfloro kaj krizantemo ambaŭ estas furorantoj el naciaj floroj.

Ĝi portas noblan kaj ĉarman aspek-

ton krom bonodoro o k u l t a, kaj ĝi



havas elegantecon ekster la mondo, des pli multe ĝi donas profundan guston al rigardantoj. Ĝi devenis de Ĉinujo antaŭ centoj da jaroj, dume ĝi variis kaj variis en Japanujo, kaj fine ĝi prezentis nunan ravan formon.



# ORIENTA KULTURO

Jaro I

Oktobro, 1936

No. 2

## Historio kaj Vivo

(Enkonduko al Orienta Historio I)

de

Kijo Cujuki

Kiamaniere ŝanĝiĝas kaj fruktdonas en la eterna estonteco la vivo de l' homaro komenciĝinta en la eterna pasinteco? Tio estas la plej granda dubo, kiun mi ektenis de mia juneco, kaj ankaŭ tio estas la ŝanco, ke mi ekinteresis la historion de l' homaro.

Efektive, de la antikveco multaj filozofoj, kleruloj kaj fondintoj de religio meditis kaj penis solvi la problemon, kiamaniere klarigu „*la esencon de l' vivo*,” kaj kie trovi „*la konstantecon de l' koro*“. Kaj iuj memkonsciante, ke ili povis solvi ĝin, favoris sian doktrinon kaj penis kulturadi. Sed, fakte ĝis nun, ankoraŭ neniu povis klarigi ĝin. Tiuj, kiuj pensis, ke ili povis klarigi ĝin, nur povis kontentigi sian avidon laŭ la postulo en la tempo de simpla prudento kun malvasta scio. Mi kuraĝas diri, eĉ se Konfucio, Ŝakamunio, Mahometo, eĉ ankaŭ Sokrato, Platono, aŭ Russo kaj Markso, la influoj de iliaj opinioj kaj doktrinoj sur la publika moralo estas tre grandaj, eĉ nun ne nur ili konservas sian superfluan potencon, sed ankaŭ, ŝajnas al mi, sian postbrilon ili trenos longe en estonteco; kompreneble ni, homaro multe devus danki ilian meriton, sed, post ĉio ili nur portas signifon de historia persono, kaj jam, eĉ nun estas tute neeble kaj sensece, ke ni kredas ilian doktrinon kiel ili estas, sen ia korekto aŭ kritiko.

Efektive, antaŭ la granda unuigo de Ĉandra Gupta en Hindujo aperis unueciga doktrino de budaistoj; antaŭ la granda unuigo de la Unua Imperiestro de Ĉin (秦) en Ĉinujo aperis unuiga ideo de konfucianoj; la gvidanta spirito de Mahometo kondukis la fondiĝon de la granda imperio Saraceno; la Kontrakto Sociala de J. J. Russo antaŭiris la grandan revolucion en Francujo; tiel same, se la tutmonda unuigo estus ja tendenco de tutmonda historio kaj espero de l' homaro, mi pensas, estus nepra vico, ke la tutmonda granda ideo kiel la gvidanta principo devus esti kreita. Kaj neniu protestus, kiu priatentas la tendencon de mondhistorio, ke hodiaŭ estus la tempo de preparo, atendo, peno kaj konstruado de fundamento.

Plie, tiu, kiu donas pravan scion kaj trafan komprenon kiel la fonto de tia fido, kaj kiel la montrilo de ĝia celo, estas nenie trovebla sen la pure penetrita vera kompreno sur la historiaj faktoj de niaj prapatroj, kiuj heredigis veron de l' vivo al siaj posteuloj dum miloj da jaroj forpasintaj. Provu. Ne nur pri politiko kaj militaferoj, eĉ ankaŭ pri religio, filozofio, scienco kaj arto, tute ne ni povas scii, kial oni akiris nunan scion de l' homaro, kaj al kiu direkto oni devas penadi, ĉu iu donas montrilon kaj povas doni doktrinon, sendepende de historiaj faktoj. En tiu ĉi senco mi porparolas antaŭ ĉio, ke urĝe grava estas studo de historio.

Studi historion signifas studi veran historion ne malĝustigitan. Historio sub la kompreno de unu principo kaj idealo viktimitigas historian fakton sub tiu principo kaj idealo kaj malĝustigas ĝin; neniam ni konsentas, ke ĝi estas historia fakto vera. Kiel ajn la principo kaj idealo estas, la kompreno laŭ tiu principo kaj idealo kreas tielnomatan historian fakton laŭ sia propra subjektiveco, kaj nur utiligas por la certigo de teoria fundamento de tiu principo kaj idealo, tial la valoro kiel historia fakto neniam diferencas kompare kun la biografio de Ŝakamunio aŭ misteraj rakontoj de kristanoj; ĝi ja ofendas karan sperton de l' homaro. Esence, neniu protestus, ke la lasta celo de reala vivo de l' homaro estas firma starigo de eterna paco kaj feliĉo eĉ en ĉiuj tempoj, tamen pri la rimedoj kaj metodoj por venigi eternan pacon kaj feliĉon religiistoj, idealistoj kaj realistoj de la antikveco ĉiuj portas sian propran opinion; hindaj filozofoj kaj religiistoj pensis venigi eternan pacon kaj feliĉon fide al sia anima forĝado per absoluta pasiva metodo, kiel ekzemple, neo de memo, malpermeso de deziro; tio evoluciis al abnegacia nirvano de Budaismo aŭ admiro de malegoisma senmemo de Jainismo; aŭ ekzistis mahometanoj kaj kristanoj, kiuj aktive deziris pacon kaj feliĉon de sia popolo aŭ de l' homaro petante grandiozan potencon de Dio, kaj por la celo ili ofte ne hezitis batali; aŭ estas ne malmulte tiuj, kiuj penadis kiel idealistoj por kulturi publikan sentimenton, aŭ kiel politikistoj prenis aktualan artifikon.

Sed, ni ne povas sufiĉe fidi ĉiun doktrinon, ĉiun ideon kaj ĉiun rimedon. Kompreneble estas la fakto, ke ni multe ĉerpis lernindan doktrinon kaj teorion el la tielnomataj orientaj ideoj, kiuj ekĝermis en Hindujo kaj Ĉinujo. Krome, ni tute ne povas nei, ke ni multe trovas kelkajn punktojn en la pasiva kaj nehumana hinda ideo en la fundamento, kiujn ni ĉiom ne povas laŭdegi kiel la universalecan doktrinon de l' tuta homaro. Same, ankaŭ la ĉina ideo en la punkto de realeco kaj prudento portas multe da lernindaj doktrinoj, tamen la ĉina ŝtato longe

ripetadis saman renversiĝon, kaj fine ne povis forlasi la feŭdalismon, tial por la universaleca doktrino de la moderna mondo, multaj neaŭtentikaj punktoj sin trovas en la doktrina teorio kiu regis la ŝtaton kaj socion.

Kaj same ankaŭ la okcidentaj ideoj, Judaismo kaj Islamo tro dense portas gentan koloron, kaj ne povas forlasi primitivan karakteron. Ni tute ne povas akcepti ilin kiel la doktrinon kiu kulturos la estontan mondon; tamen ĉiuj ja bone scias, ke politika kaj sociala ideo de libereco kaj egaleco aŭ logika ideo de filozofio kaj scienco, kiuj evoluciis en Grekujo kaj influis sur Romo, kune kun la homaranisma ideo de kristanoj, estas la trunko de eŭropa civilizacio, kaj kune kun evolucio kaj disvastigo de la eŭropa civilizacio ili superregadas la mondon.

Plie, la libereca kaj egaleca ideo de Helenoj unuvorte estas la ideo de libereco kaj egaleco propre fiksita en sia popolo, kaj ili rigardis aligentanojn krom si kiel barbarojn aŭ brutojn kaj ne hezitis sklavigi kaj ekspluati ilin; ĝi ankaŭ portis tre densan egoisman kaj ekskluzivan kolcon. Tio similas al Ĉinoj, kiuj fidis al si, ke sia propra popolo estas tielnomata „flor-homoj“, kaj rigardis najbarajn aligentanojn kiel barbarojn kaj brutojn, sed ni konstatas, ke la ekskluziva punkto estas plimulte severa kaj forta ol tiu de Ĉinoj. Ĉar, la distinga opinio kontraŭ aligentanoj, precipe en la antikva tempo de Ĉinujo, ne ĉiam estis tiel granda kaj severa; la distinga opinio de Helenoj kontraŭ aligentanoj tamen estis tre granda. Tial la punkto de tielnomata liberalismo depost Helenoj, kiuj alte taksis individuan liberecon kaj celis politikan ideon de sendependa egaleco, estas ja lerninda por posteuloj, tamen la punkto de densa egoisma kaj ekskluziva inklino estas neniel lerninda por ni.

Ankaŭ la homaranisma ideo de kristanoj, kiam ĝi estis propriigita kiel la religio de Latinoj kaj Germanoj k. a., interne ĝi estis uzata sur politiko kaj ĝi kaŭzis la tielnomatan 30 jaran militon, kaj ekstere la antipatio kontraŭ aligentanoj kaj aliaj religioj fine incitis la teruran mizeron de la tielnomata krucmilitiro; plie ĝi estis uzata kiel la avangardo de egoisma koloniiga politiko kaj imperialisma uzurpa invado, kaj ŝajne la principo de Kristanismo estis tute ignorita. En ĉiu okazo, estas klare, ke tia religio, kiu estis ekflamigita de internaj specialaj cirkonstancoj de tiama Roma Imperio, kaj kiel kontraŭanto de la socio portis multe da disputemaj karakteroj, kaj kiu estis longe protektata en speciala atmosfero kiel la propra havo de speciala popolo, ne indas esti la universaleca doktrino de l' tuta homaro.

Plie, la estimo al scio, kiu subite vigliĝis kontraŭante religian mal-klerecon, kaŭzis grandan disvolviĝon de filozofio kaj scienco; studo kaj

fiksigo de sciencaj principoj kaj leĝoj estis penata, kaj tio kondukis grandan etendigon de nuna materia civilizacio, tamen blinde kredi ĉiopovon de intelekto estas grada eraro. Lastatempe, precipe tre granda estas progreso de scienco, pro tio multe estas tiuj, kiuj falis en iluzion de scienca ĉiopovo, tamen estas nedubinda fakto, ke kuŝas limo kiun la homa intelekto ne povas superi. La sekreto de l' universo sciigita ĝis nun per potenco de scienco estas ja nur unu malgranda parto el granda mistero de l' universo, jam ne temante natursciencan kaj kultursciencan la absoluta vero fidinda neniam ekzistas.

Mi kuraĝas diri, kio ajn superstiĉo estas, ni ĝin devas disrompi. Same kiel religia aŭ vulgara superstiĉo ne estas akceptinda, ankaŭ superstiĉo sur scienco estas esceptenda. Kredi la ĉiopovon de scienco estas ja superstiĉo sur scienco. Pro tio, ke oni falas en tian iluzion, ofte senbaza nepraktikebla teorio grave influas publikan sentimenton, kaj erara opinio, kiu maltrafis studmanieron kaj klarigon de materialoj, ankaŭ ofte superregas epokon. Kiel ekzemple, estas bone konata afero, ke la nepraktikebla teorio de la Russo-skolo estis la motoro de la granda revolucio franca. Ni devas profunde pripensi, ke la sekvo al superstiĉo sur scienco aŭ troa iluzio sur ĉiopovo de homa intelekto estas danĝera.

Esence, homoj devas esti iom pli modestaj, kiam ni pripensas nian veran situacion en la universo. Eĉ se nia tre malvasta scio malfirmiĝus nur unu-du colojn aŭ unu-du futojn vaste, ni ne devas tuj arogantiĝi, kvazaŭ ni ellernis la veron de l' universo. Kompreneble teorio devas esti estimata, sed ĝi ne devas esti blinde kredata. Servi paŝon post paŝo por progreso kaj disvolvigo de la homa intelekto per starigo de nova teorio, kaj proksimiĝi al la vero estas devo de sciencistoj.

Mi ne scias, jesi la ekziston de *dio* aŭ nei. Sed, estas nedubinda fakto, ke la universo neniam estas regata de homa povo, tamen ĝi estas kreita, reguligita kaj regata de superhoma povo. Nun aperas nova teorio post nova teorio ne povante facile klarigi la fakton, kiel la homoj estis kreitaj, organizitaj kaj reguligataj. Tiuj, kiuj superstiĉas homan ĉiopova, kaj kiuj ne povas rekoni la ekziston de superhoma potenco grandioza, ne posedas povon por ĝuste rigardi fakton.

Mi ne scias, kiel nomu tiun superhoman potencon grandiozan. Kristo kaj Mahometo nomis ĝin *DIO*, Budao nomis ĝin *DARMO*, la konfucianoj nomis ĝin *ĈIELO*, kaj la taoistoj nomis ĝin *VOJO*. Laŭ la diferenco de nomoj ĉiu interna ideo ankaŭ pli aŭ malpli trovas malsamon. Sed unuvorte estas tute same, ke ĉiu signifus superhoman potencon. Provizore mi nomas ĝin „*ĉielo*“. Sed, ĝi ne koincidas la ideon de tielnomata ĉielo de konfucianoj, tamen ĝi portus plej proksiman enhavon.


# Historieto de Japana Ŝintoismo I

de

Masao Fukuda, *Fratulo de SOK*

## ENKONDUKO

Por studi Japanan Ŝintoismon ni devas rekoni Ŝamanismon, ĉar inter ili ekzistas nepartigebla rilato. En Heliolita tempo primitivaj homoj preĝis, dancis, kaj kantis ĉirkaŭ grandega ŝtono. Tio ĉi estis la komuna formo de religia ceremonio en Nordazio. Tion ni nomas Ŝamanismo. Tre vaste en la mondo loĝis tiuj azianoj, kiuj kredis la Ŝamanismon. Tiu gentaro estas nomata Ural-Altajoj aŭ Turanioj. Proto-japanoj estis ankaŭ unu el la branĉoj de tiu ĉi gentaro. Tamen en la sango de la nuntempaj japanoj sin trovas ega kunmiksaĵo el Kŭenlana (aŭ Ĉina), Indonezia (aŭ Sudpacifika), Kaŭkaza (Arja), kaj aliaj sangoj.



La plej antikvaj prapatroj de japano eble loĝis ĉirkaŭ granda lago Bajkalo en Siberio, kaj vivis aparte formante malgrandan grupon, klanon aŭ tribon. La gvidanto de klano (aŭ tribo) estis ŝamano aŭ ŝamanino, kiu estas akompanita de du personoj, demandanto kaj solvanto de diroj elparolitaj de la ŝamano. Tiuj klananoj kantis kaj dancis en serioza maniero ĉirkaŭ la ŝamano. Ili adoris kaj respektis ĉiujn naturajn fenomenojn, kiel diojn, kaj kredis, ke ili povas trovi diecon eĉ en arbo kaj en herbo. Al ili daŭris longa tempo en primitivaj vivmanieroj.

Poste nordazianoj ekkomencis transloĝadi grandamase en diversajn partojn. Primitivaj prajapanoj, kiuj loĝis apud Lago Bajkalo, transloĝis en sudorientan distrikton. Kaj poste ili venis Japanlandon transe la Japanan Maron. Eĉ post transloĝiĝo ŝamanismo ankoraŭ daŭre regis japanon. Tio estas klara laŭ la malnovaj skriboj: Nihongi kaj Hidaĉi-Hudoki, oni skribis en Nihongi jene;—

Plie ĉiuj herboj kaj arboj *parolas*.

Ĉiuj ŝamanoj havis almenaŭ du objektojn kiel Dioj, kaj kredis, ke ili estas agentoj de la Dioj. Ili povis komuniki kun animoj de la objektoj per diservado. Malsamaj dioj (animoj) aperis sur unu ŝamano, kiel gardanto aŭ helpanto de la klano. Dank' al tiu ĉi fakto la klano havis



tiom da dioj, kiom ŝamano kunrilatas kiel gardodioj.

Okaze de heredotempo de ŝamano al la sekvanta ŝamano plimultiĝis klanaj gardodioj. Sed en alia flanko ili malmultiĝis. La kialo estas, ke klanoj preferis pli bonan dion, kiam ili komparis ilin pro la certeco de profetodiroj.

La objektoj de ŝamano estis ĝenerale naturaj fenomenoj. Vere, naturaj fenomenoj estis por ili tute misteraj, mirindaj, surprizigaj kaj nesolveblaj objektoj.

La objektoj plej adorataj estis jenaj: Fajro, Vento, Suno, Luno, Monto, Rivero, Maro, Lando, Roko, Arbo kaj Herbo. Oni nomis ilin per diaj nomoj jene: Dio de Fajro, Dio de Vento ktp. Unua ŝamanismo estis polidemonismo. Ili certe kredis, ke ĉiuj estaĵoj havas siajn animojn. Japano diras tiel, „En la Sankta Lando Japanujo ekzistas ok milionoj da dioj.“ Tio sendube signifis la ekziston de multe da animoj aŭ spiritoj.

Antikvaj loĝantoj de Japanujo, Indoneŝianoj, Kūenlanoj kaj Ainoj ankaŭ havis similajn kredojn. Ili havis propran gardodion en sia tribo. En vera senco tio ĉi estis tabuo de la tribo. Antaŭ la alveno de prajapanoj el Azia Kontinento iliaj vivoj estis ĝenerale trankvilaj. Por plibone komprenigi mi klarigos pri la loĝantoj, kiuj jam loĝis, kiam Proto-japanoj envenis en tiun ĉi landon.

*Aino*, kiu eble apartenas al la Kaŭkaza Raso, estis tre pacemema.

*Kumaso* kaj *Hajato*, kiuj estas branĉoj de Indoneŝianoj, estis tre kuraĝaj kaj batalemaj.

*Tokojo*, kiu apartenas al Kūenlanoj, estis tre civilizita sub la influo de ĉina kulturo.

*Izumo*, kiu estas malsama klano, sed sama gento kun Proto-japanoj, estis ankaŭ civilizita.

*Koreo*, kiu ankaŭ estas malsama klano, sed sama gento kun prajapano, ankaŭ estis iomete civilizita; tamen ne multe sin trovis en antikva Japanujo.

*Jamato*, kiu estas originala prajapano, estis iomete civilizita.

La plej granda gvidanto de Jamato-gento por transloĝado estis Amacuhiko-Hiko-Ninigi-no-Mikoto. Li obeis la iniciativon de la Diino Amaterasu-Oomikami. De tiam ekkomencis la historio de Japanoj en tiu ĉi lando. Nun mi skizos la „Historion de la Japana Ŝintoismo“. Mi volas epokigi historian tempaĝon laŭ la plej ĝenerala rimedo, nome:

Jamato-Epoko a. k. 660—710 p. k.

Nara-Epoko p. k. 710—794

Heian-Epoko 794—1184

Kamakura-Epoko 1184—1333



Joŝino-Epoko	1333—1392
Muromaĉi-Epoko	1392—1577
Oda-Tojotomi-Epoko	1577—1615
Tokugaŭa-Epoko	1615—1868
Meiji-Epoko	1868—1912
Taiŝo-Epoko	1912—1926
Moderna Epoko	1926—

### I. YAMATO-EPOKO

Post Ninigi-no-Mikoto jam pasis kelkaj jarcentoj; kaj nun aperis granda dipersono nomata Hiko-Hohodemi (poste nomata Kan-Jamato-Iŭarebiko), kaj li pacigis multajn tribojn en Japanujo. En postaj tagoj Japanoj nomis lin la Unua Imperiestro Ĵinmu. Kiel mi skribis antaŭe, ĉiu tribo havis sian proprajn kredon kaj diojn. Sed en la tempo de Kan-Jamato-Iŭarebiko tribaj kredoj jam estis pli rafinitaj. Ilia kredo jam progresis de polidemonismo al politeismo. Tamen ankoraŭ restis multe da inklinoj de polidemonismo. Ili ankoraŭ timis sian tabuon. En vera senco kredita objekto estis tabuo de la tribo. Sed baldaŭ malaperis tia tabuo el Japanujo.

Dank' al konkerado de la Imperiestro Ĵinmu la kutimoj, moraloj kaj precipe religio estis iom post iom kunmiksitaj. La dioj, kiujn kredis la klano konkerita kaj subigita, estis malaperintaj en la kredon de la pliforta konkerinta gento. Komprenoble ilia propra kredo restas en Japanaj Mitoj ŝanĝinte sian formon, kiuj estas konstruitaj de tiel miksitaj Japanoj. Tra du stadioj polidemonisma kaj politeisma, ilia kredo estis surbazita kredi la ekziston de kvar animoj: Forta Animo, Ĝentila Animo, Feliĉa Animo kaj Mira Animo.

Ni bone povas supozi faktojn de interbataloj inter triboj, pere de la mitoj. Neparolante, mito ne estas historio, nek nura legendo. Post interbataloj nature aperis intermiksado inter ili, kiel antaŭe mi skribis. Konkerinta tribo sin starigis super la venkita tribo, kaj la kredita objekto de la unua ankaŭ okupis plibonan pozicion super la dua. Sen tiu ĉi rekono oni ne povas kompreni la verecon de la mitoj de Japanoj kaj aliaj gentoj. Laŭ la malnovaj mitoj estas klare, ke multe da indiĝenaj triboj ne povis kontraŭstari kontraŭ Jamato-gento, kiu posedis grandan armeon.

Tamen kredoj de la indiĝenoj, precipe de Kumaso kaj de Ainoj, ŝanĝiĝis de polidemonismo al politeismo; sed ili ankoraŭ timis multajn objektojn kiel tabuojn. Longan tempon ili, precipe Ainoj, ne povis forlasi polidemonisman tendencon. Ili ne nur timis la tabuon, sed ankaŭ

malbenis per la helpo de tabuo. Post la ekbrilo de la sola aŭtoritateco de Jamato-gento en tiu ĉi lando, la kutimoj, moraloj kaj precipe religioj (t. e. kredo kaj mito) fariĝis tute miksitaj. Jam tute miksitaj japanoj ekkredis, ke mortintaj prapatroj helpas ilin fari pli feliĉaj. Pro tio ili diigis siajn prapatrojn por kvietigi kaj konsoli iliajn animojn. Samtempe ili ekadoris vivantajn kaj nevivantajn heroojn kiel diojn. MIKADOISMO, kiu devas esti japana propra unika ideo, estas starigita sur la prapatro-adoro kaj la heroadoro. Eĉ en tia politeisma epoko ni povas trovi la taskon de monoteismo; ni trovas ĝin en Nihongi kaj Hurukotobumi (Kojiki). Tio estas la kredo pri la dioj Ameno-minakanuŝi aŭ Kuni-tokotaĉi. Tamen ekzistas tiaj historiistoj, kiuj pensas ke tia kredo ne ekzistis en la frua parto de Jamato-Epoko, sed nur post transveno de Ĉina literaturo ĝi naskiĝis. Sed mi firme insistas, ke jam estis tia kredo en la pratempo. Enhavante du elementojn de politeismo kaj monoteismo, la Japana Ŝintoismo disvolviĝadis ĝis la nuna tempo.

Tamen oni baldaŭ forgesis tiajn prapatrojn kiuj estis malfortaj kaj negrandaj, sed potencaj grandaj herooj kaj prapatroj estis adoritaj dum longa tempo, kiel dioj, nome: Izanagi, Izanami, Amaterasu, Susano, Ookinunuŝi ktp. Legante la mitojn ni ne povas distingi ilin, ĉu ili estas dioj aŭ herooj, kaj ankaŭ, ĉu ili estas realaj aŭ nur abstraktaj. En vera senco, al prajapanoj, respekti Mikadon estis tute nature, ĉar Mikado havis la plej grandan potencon kaj kapablon inter japana gento. Verŝajne la Mikado-adoro fariĝis unu el religiaj sentoj. Li ja estas dio, samtempe estas homo, ĉar Japana Ŝintoismo estas teantropia religio.

De la prapatro-adoro devenis la kredo de *Ujigami* (gardodio de klano aŭ tribo). Poste ŝanĝiĝis ĝia signifo al gardodio de naskiĝloko. Tra la tuta homa historio ne ekzistis eĉ unu tago, en kiu ĉiu ne havis kontraŭstaron. Ankaŭ en tiu ĉi lando ekzistis inter ili pli malpli kontraŭstaroj reciprokaj, tamen pluraj indiĝenaj triboj estis tute pacemaj. La gardodio nature selektiĝis pro la batalo kaj miksado, kaj en praidaj tempoj nur restis unu gardodio por konkerinta kaj konkerita popoloj. Konkerita popolo ankaŭ fidis, ke la propra gardodio de siaj prapatroj devis esti la dio, kiun ili nun ja adoras. Por servi al gardodio, ili konstruis adorejon (*Jaŝiro*), kiel loĝejon aŭ sidejon de la dio. Ili komuniĝis kun dio ĉe tiuj sanktejoj. Tio devis esti natura religia sento.

La prajapanoj ankaŭ enkondukis en sian kredon alian dion, kiun kredis alia indiĝena tribo, por pace akordiĝi kun tiu tribo. La plej klara ekzemplo estas la kredo pri O-Jamauĝi-no-Kami, kies kredo ankoraŭ restas en tiuj distriktoj, kies bordoj estas atakataj de Nigra Marfluo. La kredo de O-Jamauĝi-no-Kami estis la propra kredo de Indonezianoj, kiuj

transvenis al Japanujo flosveturante sur Nigra Marfluo de la Sud-Pacifikaj insuloj, en tre frua pratempo. Al prajapanoj konkeri ilin estis tute malfacile. Pro tio prajapanoj enkondukis ilian kredon en sian Ŝintoismon. Kompreneble ni ankaŭ povas tiel supozi, ke ankaŭ oni miksigis kaj poste ekkredis duope iliajn diojn. En malfrua tempo de Jamato-epoko, Budaismo estis venigita de Koreujo kaj Ĉinujo.

La tiamaj inteligentuloj tuj ekkredis nove envenintan Budaismon kaj ĝuis la novan kulturon, kiu estis tute mirinda por ili. Tamen estis kelkaj potenculoj, kiuj ne volas akcepti la novan fremdan religion kaj ege kontraŭis ĝin, sed tamen, ili baldaŭ estis pereigitaj de la subtenantoj de Budaismo. Princo Umajado (Ŝotoku-taiŝi) estis tre fervora subtenanto de la nova religio. Dank' al lia klopodo Budaismo ekprosperis en Japanujo.

Ŝajnis, ke Ŝintoismo baldaŭ malaperos de Japanujo. Sed Budaismo nur ŝanĝis Ŝintoismon al pli alta kredo. Ĝenerale estis dirite, ke la japana iniciativeco kreis alian novan religion. Tamen ĝi ankaŭ estas nomita Budaismo. Sed estas pli prave, ke Ŝintoismo influis Budaismon kaj Budaismo ankaŭ ŝanĝis Ŝintoismon. En la fundamentoj de Budaismo kaj Ŝintoismo, ili ambaŭ estas teantropiaj religioj. Pro tio ili ambaŭ bone miksigis. Baldaŭ post la enveno de Budaismo aperis tiel miksitaj religio, kiun oni ne povas diferencigi, ĉu ĝi estas Budaismo aŭ Ŝintoismo. Tia kredo kreskis en popolamasoj dum longa tempo.

En la malfrua tempo de tiu epoko aperis piulo nomata En-no-Ŝokaku, kiu miksis Budaismon kun natur-adoro de Ŝintoismo. Li grimpis altan montaron virgan kaj tie li adoris natur-diojn, kiel reapero de Budao. Lia doktrino longe daŭris inter amasoj.

Por kompreni Jamato-Epokon, ni devas antaŭ ĉio memori, ke jam en la mezo de tiu epoko ekzistis diferenco inter tribo kaj klano. Tiel bone miksitaj Japanaj klanoj nun tute unuiĝis kiel unu granda popolo. tamen ĝi havis diferencojn laŭ klaso kaj profesio interne. La formo de la politiko en Jamato-epoko estis teokratia reĝimo. La plej grava afero de regado estis diservo kaj konsolo por dioj.

#### NOTO 1

De la komenco de Ŝintoismo jam ekzistis sinpurigado (*Kijome* kaj *Hurai*), kiu estis la plej grava ago de Ŝintoisma rito. Tiun fakton ni trovas en ĉiu paĝo de malnovaj skribaĵoj. Ĝenerale estas dirite, ke ĝi devenis de la kutimoj de Indoneziano aŭ Malaja Insulano.

## II. NARA-EPOKO

En Nara epoko prosperis Budaismo en Japanujo. Aperis pluraj gvidantoj de Budaismo. Mikadoj ankaŭ kredis ĝin kaj konstruis multe

da grandaj temploj. Multaj ĉinoj transloĝis al Japanujo por disvastigi Budaismon, konstrui budaismajn templojn kaj instrui ĉinajn belartojn kaj literaturon. Dank' al ili la civilizacia nivelo de Japanujo rapide altiĝis kaj tre proksimiĝis al la tiamaj ĉina kaj hinda. Kvankam plej parto da japanoj konvertiĝis al Budaismo, tamen, ĉiam fluis Ŝintoisma pensmaniero en la fundo de iliaj koroj.

En la sama epoko jaron post jaro malaperis natur-adoro kaj primitiva kredo pro la influo de Budaismo. Tia kredo ŝanĝiĝis al adoro pri personecaj dioj. En primitiva tempo oni adoris naturfenomenojn, kiel se ili mem estus dioj, sed en tiu ĉi epoko oni ekkredis ekziston de tiaj dioj, kiuj havas la potencon okazigi fajron, venton, ktp. Ili ankaŭ nomiĝis same, kiel en pli antikva tempo, sed la enhavo de la vortoj estis tute progresintaj.

En tiu ĉi epoko, aperis la kredo pri Honĉi-Suijaku (Reapero de la Budao Granda). Tiu ĉi kredo estas klara laŭ la doktrino de Gjoki. Li kredis jene: Gotamo, fondinto de Budaismo, ree naskiĝis en Japanujo, kiel la dio Ominamuĉi. En postaj jaroj tiu ĉi pensmaniero disvolviĝis per multaj budaistoj kaj ŝintobudaistoj. Tiel Budaismo kaj Ŝintoismo estis bonharmonie intermiksitaj. Ankoraŭ nun en malnovaj temploj kaj sanktejoj ni povas ofte trovi tian spegulon, sur kies reverso budastatuo estas gravurita. Spegulo estas ja simbolo de Japana Ŝintoismo, kaj budastatuo, kompreneble, simbolo de Budaismo.

Dum tiu ĉi epoko aperis tre danĝera afero por Japana Mikadoismo. Ĝi estis la influo de troa grandiĝo de budaisma potenco. Budaisma bonzo Juge-no-Dokjo estis tre respektata kaj favorata de siatempa Mikado. Li povis akiri tro grandegan potencon politike. Ankaŭ li havis kapablon esti respektata de popolo. Ekzistis multaj korteganoj, kiuj adoris lin kiel vivantan budaon. Fine, li eĉ ekvolis havi la tronon. Estis tre danĝera momento por Japana Mikadoismo. Tiam aperis Ŝinto-kredanto nomata Ŭake-no-Kijomaro alportante orakolon de Sanktejo Usa-no-Haĉiman. Mikado akceptis lian proponon, la orakolon.

Tamen tiam estis floranta epoko de Budaismo; sed malgraŭe, okaze de danĝera afero Ŝintoismo gvidis japanan popolon. (*daŭrigota*)

#### NOTO 2

Ni devus priskribi pri la grandaj entreprenoj, en kiuj niaj prapatroj en Nara epoko sukcesis verki valorajn kronikojn, Hurukotobumi (Kojiki: Priskriboj pri antikvaj aferoj); Nihongi (Nihonŝoki: Kroniko Japana) kaj Hudoki (Priskriboj pri antikvaj legendoj, moroj, kutimoj, mitoj ktp. en diversaj distriktoj).

# Skizo sur Aina Literaturo II

de

Masami Igarashi, *Fratulo de SOK*

## III. Disvolvigo de Aina literaturo.

Kiam ni esploras centojn da epopeoj ekzistantaj, kiujn tra generacioj heredadis kaj recitadis Ainoj nur buŝe, sed ne skribe, ni povas klasifiki ilin jene: *kamui-jukar*, *oina*, *jukar*, *haŭki* ktp.

*Kamui-jukar*, himno de dio, estas tiel dire klariga mito pri la origino de dioj, aŭ la deveno de ritoj kaj kultoj k. c., konsekvence la epopeojn en tiu klaso ni povas nomi mitologie „natur-mitoj“, ĉar ilia enhavo intime rilatas al la religia kredo de Aina popolo en animisma stadio. Kaj el ili kelkaj havas nur dekojn da versoj, dum aliaj centojn, eĉ milojn da versoj. Alivorte, nombro de versoj montras al ni primitivecon aŭ progresecon de la epopeo. *Oina* aŭ sankta tradicio estas grava epopeo religie, kies heroo estas *Okikurmi*, antropomorfa dio kaj ankaŭ rigardata kiel la prapatro de Ainoj. *Okikurmi* havas du alinomojn: *Oinakamui* kaj *Ainurakkur* (laŭlitere: hom-odor-ulo). Laŭ Aina kredo tiu ĉi dipersono ordigis kaj kulturis ĉion en Aina socio, kaj tial ĉiu faro, ĉiu diro de *Okikurmi* estas precipe traktita kiel la modelo aŭ la fundamento de la vivo de Ainoj. Li ja ludas la rolon de Prometeo en Greka mitologio kaj ankaŭ de *Okuninuŝi*, kultur-dio en Japana mitologio. Sekve la epopeoj en tiu ĉi kategorio estas kultur-mitoj, kiuj povus formi la Bibliion de Ainoj.

*Jukar*, simple himno aŭ balado, estas tre ampleksa epopeo, kies heroo estas *Poijaunpe*. La *jukar*-epopeoj estas tute grandiozaj per nombro de versoj kaj tre pompaj per rakontoj sur la temo de multaj aventuroj de la menciita heroo. Ili neniom malsuperus Odiseon, nek Iliadon de Homero per diversaj karakteroj. En ili ni povas unuafoje vidi pure literaturajn produktaĵojn de Ainoj for de la religia konscio.

*Haŭki* (*Hau-ki*) estas epopeo de Ainoj en Karahuto (Sagaleno), kies heroo estas *Ponotaŝtunku*. Tiu ĉi ankaŭ faras diversajn aventurojn same kiel *Poijaunpe*.

Antaŭ ol disvolvi pli detale ĉiun el la epopeoj ni devas atenti unue, ke la rakonto en epopeo estas por ĉiam la aŭtobiografio aŭ

monologo de la heroo aŭ heroino; nur en la fino de recitado la minstrelo aldonas frazon, *sekoro—kamui yaiyeyukara* (tiel—dio mem kantis), aŭ similajn. Kaj due ni rimarku la formon karakterizan de epopeoj: en Ainaj epopeoj ne ekzistas formo de verspiedoj, nek metodo de rimaranĝo. Nur ekzistas tre libera metodo de ritmo; ĉiu verso de epopeo konsistas ĝenerale el kvar aŭ kvin silaboj konvene al la recitado de minstrelo, kaj kiam okaze venas longa verso, ekz. sepsilaba, ankaŭ la sekvanta verso devas esti aranĝita per la sama aŭ simila silabnombro kiel la antitezo por la unua<sup>1)</sup>. Kaj abunde troviĝas ankaŭ konkatenacio de versoj per ripeto de sama vorto. Refreno aŭ pleonasmo estas ofte metata ĉe la komenco de ĉiu verso aŭ strofo de epopeo, precipe *kamui-jukar*. Tia refreno foje estas onomatopeo por la muĝo de bestoj aŭ la pepo de birdoj, aŭ foje estas nura ekkrio, kies signifon ni ne povas kompreni. Tiu ĉi sistemo de Ainaj epopeoj multe malfaciligas traduki ilin en alian lingvon kaj reprodukti en la traduko la formon, metron kaj sencon de la epopeo, kiom eble plej fidele al la originalo; la samon mi povus vidi ankaŭ en la traduko de „Kalevalo“, mondfama popola epopeo de Finnlando, kies originalo havas simplan kaj flekseblan metron,<sup>2)</sup> kaj kiu, laŭ mia opinio, ŝajnas posedi multe da analogoj kun la epopeoj de Ainoj, ambaŭ estante la primitiva popola literaturo.

Nun mi prezentos mallongan epopeon el *kamui-jukar* sub la temo: *Terkepi yaiyukar „Tororo hanrok hanrok!“* (Kanto, kantita de Rano pri si mem.)<sup>3)</sup> Kiel la temo jam montras, tiu ĉi versaĵo estas aŭtobiografio de rano (*terkepi*) pri sia historio. „*Tororo hanrok, hanrok!*“ estas aina esprimo onomatopea por la kvako de ranoj, kaj ankaŭ mi povus nomi ĝin pseŭdorefreno, ĉar ĝi ne ĉiam aperas ĉe la komenco de ĉiu verso, sed nur en kelkaj linioj.

„Tororo hanrok, hanrok!“  
 En unu tago, dum mi tra herbejon  
 Saltadon ludis, mi kabanon trovis.  
 Alproksimiĝis mi al ĝi. Tra l' pordo  
 Altaron mi okaze tie trovis.—  
 Apude de monteto da trezoroj,  
 Kun mallevita kap' junulo sidis  
 Glavingon gravurante sur l'altaro—  
 Vidante ĉi tion sur soj' eksidis  
 Pro petolemo, al li mi malhelpi:  
 „Tororo hanrok, hanrok!“ mi kantetis.

Kaj la junulo haltis en laboro,  
 Al mi li kun ridet' rigardon ĵetis:  
 „Ha, tia estas do la kanto via,  
 La kant' de l' ĝojo? — do, mi plue petas!“  
 Ĝojigis min tre multe diro lia;  
 „Tororo hanrok, hanrok“ mi ripetas —  
 Kaj la junul' denove laŭde diras:  
 „Ĉu tia estas via sakehaŭo\*? (unu speco de festkanto)  
 Aŭskulti pli proksime mi deziras“ —

Tre ĝoja sursaltas sur forn-kadron  
 Ĉe l' sidej' subula, kaj akcente  
 „Tororo hanrok, hanrok!“ jen mi kvakis.  
 Kaj la junulo diras tre kontente:  
 „Ĉu tia estas sakehaŭ', jukaro?  
 Ĉu tia estas via kant' de l' ĝojo?  
 Do, lasu min aŭskulti pli proksime!“  
 Ĝojegon mi ja sentis; en ĉi fojo  
 Sursaltis sur forn-kadron, sed apenaŭ  
 „Tororo hanrok, hanrok!“ mi ekkvakis.

Subite la junul', — kun lign' brulanta  
 Stariĝis, kaj sur min li ĵet-atakis: —  
 Ektondris granda bru' ĉe mia brusto,  
 Kaj tute senkonscia mi fariĝis! . . .  
 Nu, kiam la konsci' al mi revenis,  
 Ĉe anguleto de polvej' troviĝis  
 Mortinta ran', ŝvelventra, inter kies  
 Oreloj sidis mi — kaj kiun prenis  
 Mi por la homloĝej' en ver', diulon  
 Okikirmuj,\* la bravan apartenis! (\*dialekto de Okikurmi)  
 Malatentemo mia min kondukis  
 Al ĉi fi-morto, do, vi, ran-praidoj  
 Neniel al la homo alpetolu!  
 — Per dir' ĉi tiu ran', ŝvelventra fine mortis.<sup>1)</sup>  
 (daŭrigota)

## Notoj

- 1) K. Kindaiĉi: 「アイヌ文學」, *Aina Literaturo*“, p. 158—159.
- 2) W. F. Kirby: „Kalevala“, Vol. I, *Introduction*, p. viii—ix.
- 3) F-ino J. Ĉiri: 「アイヌ神謠集」, *Servio de Kamui-jukar*“, p. 102—105.
- 4) Traduko de K. Matuba „La Revuo Orienta“, Vol. VII, p. 246.



## SOCIETO DE ORIENTA KULTURO

SOK celas diskonigi Japanan kaj Orientan Kulturon kaj harmoniigi Tutmondan Kulturon per ESPERANTO. Por tiu ĉi celo SOK eldonas kvaronjaran ĵurnalon „Orienta Kulturo“, jaran „Bulteno de SOK“, kaj librojn pri Orientalismo kaj Japanismo. Artikoloj pri ĝia celo estas bone akceptataj. Manuskriptojn Red. ne resendas. Honorario nepagebla. REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO: Ĉe Kijo Cujuki, Komagome-Dozaka 228, TOKIO, Japanujo. Membrokotizo por unu jaro: Pasiva Membro; — 2 jenoj, Aktiva Membro; — 3 jenoj, Subtena Membro; — 5 jenoj. Rekte pagu per poŝtmandato aŭ egalvaloraj internaciaj respondkuponoj al la administracio. (Poŝta Ĉekkonto: TOKIO. 103.523.)

## 東洋文史研究所規約

## Societo de Orienta Kulturo

- 第一條 本會ヲ東洋文史研究所ト名付ク
- 第二條 本會ハ主任一名、幹事及研究所員若干名、及會員ヨリ構成ス
- 第三條 本會ノ事務所ヲ當分ノ間東京市本郷區駒込動坂町二二八露木清彦方ニ置ク
- 第四條 本會ハエスペラントヲ利用シ東西文化ノ融合ヲ計リ日本ヲ中心ニ東洋ノ文物史實ニ關スル知識ノ世界的普及、研究者ノ交詢ヲ目的トス
- 第五條 本會ノ目的達成ノ爲左ノ事業ヲ行フ  
 イ. 機關誌及圖書ノ刊行  
 ロ. 文献ノ蒐集調査翻譯研究發表  
 ハ. 其他必要ト認メタル事項
- 第六條 本會ハ事業遂行ノ爲左ノ機關ヲ設ケ幹事及研究所員之ヲ分擔ス  
 イ. 庶務部    ロ. 會計部    ハ. 編輯部  
 ニ. 出版部    ホ. 企劃部    ヘ. 圖書部
- 第七條 本會ノ趣旨目的ニ賛シ本會ノ經費トシテ所定ノ金額ヲ寄附スル方ヲ會員トス  
 イ. 普通會員年額一圓
- ロ. 正會員年額二圓  
 ハ. 贊助會員年額五圓  
 ニ. 特別會員一時金十圓以上  
 ホ. 終身會員一時金百圓以上
- 第八條 本會々員ハ機關誌ノ配布ヲ受ケ刊行圖書ノ割引ヲ受ク、又研究ノ便宜ヲ受ケ其研究ヲ機關誌ニ發表スルコトヲ得
- 第九條 本會主任ハ研究所ヲ代表統轄シ幹事會ノ召集ヲ行フ
- 第十條 本會幹事會ノ決議及内規ニヨリ事務ヲ處理シ將來必要ニ應ジ本規約ノ變更ヲナスコトヲ得ルモノトス
- 以 上
- 事務所 東京市本郷區駒込動坂町二二八  
露木清彦方
- 東洋文史研究所  
振替口座東京 103.523 番

昭和 11 年 10 月 10 日 印刷  
 昭和 11 年 10 月 15 日 發行

Oriente Kulturo 第一年第二號  
 季 刊

[定價一部 30 錢 送料 2 錢]  
 [一年購讀料 1 圓 20 錢]

編輯印刷兼發行者

露 木 清 彦  
 東京市本郷區駒込動坂町 228

發 行 所

東洋文史研究所  
 東京市本郷區駒込動坂町 228

